

## Antaŭparolo pri la Kezia trilogio

Katherine Mansfield [Kathleen Beauchamp] naskiĝis en 1888 en Novzelando, kaj mortis pro tuberkulozo en 1923 en Francio. Ŝi verkis ĉirkaŭ 90 novelojn; multaj estas tradukitaj en plurajn aliajn lingvojn. Oni rekonas ŝin, kiel unu el la grandaj aŭtoroj de la mondo. Ŝia verka stilo uzas la voĉon, sintenon kaj esprimojn, sen citiloj, stereotipe de la persono mem, kiun ŝi mencias aŭ priskribas.

*'Ne ekzistis centimetro de spaco sur la kaleŝo,'* rivelas la sintenon de la patrino en la novelo; ĝi ne necese estas la objektiva juĝo de Mansfield. [*Preludo*]

*'La tuta mondo skuiĝos, al unu ruina tombejo,'* temas pri timo en la menso de Linda, ne de la aŭtoro, ne eĉ de la frato de Linda en tiu sceno. [*Ĉe La Plaĝo*]

*'La posttagmezo jam estis abomena,'* montras la pli fruan koleron de Berila, kaj ne priskribas la spertojn de Kezia aŭ la fratinoj Kelvey. [*La Pupa Domo*]

Malfrue, Mansfield sopiris verki romanon pri sia frua vivo en Novzelando sed malsano ne permesis. Tamen la tri parte biografiaj noveloj pri Kezia imitas ŝian infanan vivon, kvazaŭ cent-paĝa komenco de tia romano.

**Preludo:** pri la familianoj kaj ties moviĝo el *Tinakori Road* en Velingtono, kaj iliaj diversaj kutimiĝoj, aŭ ne, al la nova hejmo ĉe *Karori* en tiutempe bovina kamparo.

**Ĉe La Plaĝo:** pri rilatoj kaj revoj, dum familia ferio en la marborda vilaĝo, *Days Bay*, trans la haveno de Velingtono; iuj filozofias pri morto, sorto kaj dunga servuto.

**La Pupa Domo:** tra snoba antaŭjuĝo kontraŭ du knabinoj en eta lernejo ĉe *Karori*, ĝis homa komplezemo por la etulinoj. Berila ree rolas kun Kezia en la elnodiĝo.

Tiuj noveloj temas pri vivo antaŭ cent jaroj, kaj *Esperanta Bildvortaro* far Rüdiger Eichholz ankaŭ temas pri vivo antaŭ cent jaroj, do estas riĉa fonto por kontroli terminojn.

Mansfield dorlotis sin pri novzelandaj eroj: 'morepork' [mopoka strigo], 'lacebark' [hoheria arbo], 'toetoe' [flava kortaderio], 'fantail' [ventumila ripiduro], 'paua' [iriza halioto], 'straight dinkum' [rekte aŭtentika]; kiujn ŝi memoris en nostalgio. Ŝi uzas la maorian nomon, 'manuka', [manuka arbo], anstataŭ tiama 'tea-tree', sed efektive priskribas alian arbon, 'kowhai' [flava soforo]. Kien oni traduku ĝin?

Por la Esperantigo, ĉi tradukisto preferis akcepti nur PIVajn vortojn. Tamen por necesaj vortoj sen traduko en *Benson* aŭ *PIV*, ekzemple por tiuj, ĉi-supre, oni konsultis en *Aŭstralio kaj Novzelandaj Esperanto-Vortaro*:

<http://www.esperanto.org.nz/anzed/anzed.html>

kaj en *Komunlingva Nomaro de Novzelandaj Birdoj*:

<http://www.esperanto.org.nz/pdf/birdoj.pdf>

Dankon al D-ro Donald Rogers pro lia zorgema kontrolado de la malneta traduko.

Brian Fox, tradukisto

## Glosaro [etimo]

- bobeli** eliro de aeraj aŭ vaporaj vezikoj en akvo dum bolado [*bobbel, bubble*]
- boŝo** nekultivata regiono, plene de arboj arbustoj lianoj veproj filikoj [*bos, bosch, bush*]
- fukcio** genro *Fuchsia* de arboj arbustoj grimpuloj, kun pendantaj floroj [*Fuchsia*]
- greso** herbo en familio *Gramineae* uzata por gazono, bruta furaĝo [*gress, gras, grass*]
- halio** manĝebla molusko en genro *Haliotis*, maorie *pāua*, angle *abalone* [*Haliotis*]
- hoheria** arbo en genro *Hoheria*, angle *lacebark tree* [*Hoheria*, maorie *houhere*]
- kalifora muŝo** zume brua granda muŝo en genro *Calliphora*, angle *blowfly* [*Calliphora*]
- kniphofio** ruĝa floro sur alta tigo en genro *Kniphofia*, angle *red-hot-poker* [*Kniphofia*]
- kortaderio** grande tufa gresa specio *Cortaderia toetoe*, maorie *toetoe* [*Cortaderia*]
- kribaĝo** kartludo por du, kun tabulo por registri poentojn [*cribbage*]
- majno** birdo el sudorienta Azio parence al sturno [hinde *mainā*, angle *mynah*]
- manuka** arbo en genro *Leptospermum*, kun blankaj aŭ ruĝaj floroj [maorie *mānuka*]
- melifago** birdo kun blankaj plumoj ĉe la gorĝo, maorie *tūi* [familio *Meliphagidae*]
- mohuo** eta birdo en genro *Mohoua*, angle *yellowhead* [*Mohoua*, maorie *mōhua*]
- mopoko** eta strigo *Ninox novaeseelandiae*, maorie *ruru* [angle *morepork, mopoke*]
- naĝvesto** vestaĵo por publike naĝi, kaj sune bruniĝi, alie: 'bankostumo'
- ripiduro** eta birdo *Rhipidura fuliginosa* kun ventumile forma vosto, angle *fantail* [*Rhipidura*]
- skono** meze dolĉa kuko el faruno butero akvo, rapide baki [*scone*]
- soforo** genro de arboj, kun 5-petala sonorile forma floro, maorie *kōwhai* [genro *Sophora*]
- uvo** frukta bero de vito por manĝi prefere ol fari vinon, alie 'vinbero' [hispane, itale *uva*]
- verniso** oleo kun sekigiloj por ŝmiri sur ligno por senkolora tavolo [*vernis, vernice, varnish*]
- vorcestra saŭco** anglia saŭco el melaso vinagro sojo fiŝosto [urbo *Worcester*]